



ESPERANTO EN MARCHE

LA BENELUKSA KONGRESO
ESTIS BELA SUKCESO!



ni faris

ESPERANTO-FESTO EN LIEÛ
UNIVERSALA KONGRESO EN AFRIKO!

ni faras

NOVA KURSO EN NAMUR

ni faros

ZAMENHOFFESTO EN LESSINES
GE-BENELUKSA KONGRESO EN 2025

Revue trimestrielle belge

AUTOMNE 2024 - N°3



Informations

Informoj

L'asbl Espéranto Wallonie (anciennement APE) a pour objet la diffusion de l'espéranto, langue auxiliaire internationale, conçue dans le but de faciliter la communication entre locuteurs de langues maternelles différentes.

La V.Esp-o (Espéranto Wallonie) agit en Wallonie directement ou en soutenant les groupes locaux, les tables de conversation et toute initiative individuelle, avec le support de la FWB.

Ses principales activités sont l'organisation d'événements et de formations, la participation à des festivals, le support des Verdaj Skoltoj, des groupes locaux et des tables de conversation.

Comment soutenir nos actions ?

- Participez à nos événements
- Contribuez à cette revue
- Rejoignez notre équipe
- Devenez membre
- Offrez-nous un café via un don mensuel de 3 € ou plus sur notre compte avec la mention « don »

Avec le soutien de



FÉDÉRATION
WALLONIE-BRUXELLES

Devenir membre / Membrigi

MEM (membre > 25 ans + revue) 25 €

JUN (membre < 25 ans + revue) 12 €

FAM (cohabitant pas de revue) 5 €

REV (abonnement revue seule) 12 €

À payer sur le compte d'Espéranto Wallonie
BE33 5230 8132 1946 avec les mentions correspondantes. Voir sur le site

www.esperanto-wallonie.be

E-mail : esperanto.wallonie@gmail.com

Nos partenaires / Niaj partneroj

- International : Universala Esperanto Asocio (UEA) Rotterdam et SAT (Paris). Point de contact, Claude GLADY : 071 644 916 cglady@arcadis.be
- Belgique : Belga Esperantista Federacio (BEF). La coupole du mouvement. www.esperanto.be/bef Yves Nevelsteen 0472 106 086 yves.nevelsteen@gmail.com
- Flandre : Flandra Esperanto-Ligo (FEL) 03 234 34 00 www.esperanto.be info@fel.esperanto.be
- Bruxelles : Esperantista Brusela Grupo (EBG). Nikolao de BUYL : nikolao@esperantobruselo.org 0478 382 981 www.esperantobruselo.org
- Verviers (Senlime) : Jean-Marie JACQUES 087 330 292 jacques@senlime.org
- Jeunes : Verdaj Skoltoj, asbl. Scoutisme sans frontières en espéranto. info@verdajskoltoj.net Valère DOUMONT 0485 517 552 www.verdajskoltoj.net

Photo sur la couverture : Le congrès du Bénélux à Hasselt. Photo de An Olijslagers.

Contenu / **Enhavo**

- Aktivas junaj esperantistoj - 4
- Tutbelga Zamenhoffesto - 5
- Turisma tago en Lieĝo - 6
- Studsemajnfino en Ipro - 8
- Kursoj en Valonio - 9
- Belgoj en la UK en Afriko - 10
- Ekskuro al Nepalo - 12
- Novaĵoj el Esperantujo - 14
- Esperanto en Flandrio - 16
- Inspiraj rakontoj - 17
- Krucvortenigmo - 18

Colofon / **Kolofono**

Ce magazine est édité
par l'asbl Espéranto
Wallonie - Rue de la
Terre Franche, 33 -
5310 Longchamps.
Rédacteur en chef :
Jean Annet
Rédaction et mise en
page : Yves Nevelsteen
Imprimé par Lebrun
Communications à Strée



Éditorial **Antaŭparolo**

La semajnfino de la 20 ĝis la 22-a de septembro okazis la Beneluksa Kongreso (vidu la foton de la kovrilo). Kiel kutime estis okazo por belgaj esperantistoj, kaj ne nur, renkontiĝi kaj pli bone koni unu la alian. Dum tiu kongreso kutime okazas ĝeneralaj asembleoj, kiel la nia de V.Esp-o, sed ankaŭ tiu de Belga Esperanto-Federacio (BEF).

Estis speciala asembleo de BEF, ĉar elektiĝis nova estraro. Oni dankis Kiki Tytgat pro sia presidanteco, ĉar ŝi estris tiun 'fantoman asocion' kun klereco kaj efikeco. BEF estas fakta asocio kiu havas nek statutojn, nek kontojn. Ĝiaj celoj estas tre limigitaj ; BEF ĉefe celas 1) kunordigi la agadon de la regionaj asocioj en Flandrio, Bruselo kaj Valonio kaj 2) reprezenti belgan asocion fronte al UEA, ĉar ĝi ne agnoskas regionajn asociojn. Tamen estis kelkaj belaj realigoj en la pasintaj jaroj: ni sukcesis bone interkonsenti pri komunaj belgaj Zamenhoffesto kaj Beneluksa Kongreso. Okazis kaj okazos relative multaj Esperanto-renkontiĝoj en nia regiono - ni rajtas fieri pri tio !

Oni tamen ankoraŭ pli kunlaboru trans lingvaj, regionaj kaj ŝtataj landlimoj. Eble BEF povas ludi estonte pli grandan rolon en tio, informante pri kaj instigante al agado. Oni pli profesiigu la agadon, kreante bonan strukturon kaj internan regularon. Ĉu ne estas tempo por freŝa komenco?

Jean ANNET

Activités des jeunes espérantistes

Aktivas junaj belgaj esperantistoj!



VSKK

La junulara renkontiĝo por klaĉi post la somero. Unue organizita de FLEJA kaj NEJ. Poste de NEJ. Ĉi-jare organizita de la Verdaj Skoltoj! Post PSKK (Post-Somera Klaĉ-Kunveno) kaj KKPS (Klaĉ-Kunveno Post-Somera) nun venas VSKK (Verdaj Skoltoj Klaĉ-Kunveno)! **Kiam?** De vendredo la 25-a de oktobro ekde la 17-a horo ĝis dimanĉo la 27-a de oktobro je la 15-a horo. **Kie?** En la pligrandigita Centre d'Hébergement du Château de Tilff, Esplanade de l'Abeille, 9, 4130 Tilff. Detaloj: <https://mallonge.net/vskk24>

JES

La Junulara E-Semajno (JES) estas novjara junulara esperanto-aranĝo kutime organizata de Pola Esperanto Junularo (PEJ)

kaj Germana Esperanto-Junularo (GEJ). Ĝi okazas ĉiujare dum lastaj tagoj de decembro kaj unuaj tagoj de januaro, proksimume dum unu semajno, en iu loko en Meza Eŭropo. Laŭ formo, sed ne laŭ sezono, ĝi similas do al Internacia Junulara Kongreso. **Ĉi-jare junaj belgaj esperantistoj organizas JES! Kiam?** De la 27-a de decembro 2024 ĝis la 2-a de januaro 2025. **Kie?** En lernejo de Saint Rock Ferriers kaj internulejo en Bernardfagne.

Iru al la retejo de JES por ekscii detalajn informojn pri la kongresejo, kotizo kaj iom poste ankaŭ la programo de JES 24-25. <https://mallonge.net/jes24-25>



Fête Zamenhof à Lessines

Tutbelga Zamenhoffesto en Lessines

La venonta Zam-festo estos vera Zam-Kulturtago. Post bonega manĝo ni vizitos la Hospitalon Notre-Dame à la Rose en Lessines. Fondita en 1242, la Hospitalo estas malofta kompleta ekzemplo de aŭtarkia hospitalejo de la Mezepoko.

mallonge.net/zamfesto2024

En **sabato, la 14-an de decembro 2024** ni kune festu la naskiĝtagon de Zamenhof, la tagon de la Esperanto-libro kaj de la Esperanto-kulturo. Jen la programo:

11h30 bonvenigo

12h00 manĝo

14h30 - 16h30 vizito kun profesiaj

ĉiĉeronoj franclingva kaj nederlandlingva

17h00 kafo kaj teo

Kotizo: 40 eŭroj

Aliĝu per la ligilo menciita en Eventa Servo:

<https://mallonge.net/zamfesto2024>

La festejo troviĝas je 400 metroj de la stacidomo de Lessines.



© <https://visitwallonia.be>

La fête mondiale de l'Espéranto

Sukcese okazis turisma tago en Lieĝo

Sabaton la 27-an de julio 2024 (anstataŭ la 26, vera dato), ESPERANTO-LIEGE proponis kunvenon por memori la unuan eldonadon de la lingvo Esperanto, kiu okazis la 26-an de julio 1887. Intertempe, ĉi tiu lingvo pli kaj pli disvolviĝis tra la mondo por nun prezentiĝi kiel reala solvo por komunikado inter homoj.

Ĉeestis 19 personoj el pluraj regionoj, sen kalkuli kelkajn homojn, kiuj nuligis pro diversaj neatenditaj kialoj.

Malgraŭ la pluva vetero, la renkontiĝo estis granda sukceso. Ni komencis vizitante la "Musée de la Vie Wallonne", interesinda muzeo, kiu enhavas tre grandan nombron da iloj kaj objektoj ligitaj al la pasinta vivo kaj la industria epoko.

Poste ni ĉiuj tagmanĝis en la proksima restoracio "le Cloître", kiu proponis tipajn valonajn pladojn je modesta prezo. Je la fino, Mark Vanden Bempt prezentis la arkivprojekton en Diest.

Iom poste, nia prezidanto Freddy Close kondukis nin al la fama "Escaliers de Buren", poste al la preĝejo Saint-Barthélemy, kaj fine tra la mirindaj malnovaj sakstratoj

kaj kaŝitaj ĝardenoj.

La laŭplana uzo de la rivernavedo ne okazis pro manko de tempo kaj entuziasmoj.

Kunveni en loko malfermita al ĉiuj estas la plej bona maniero por aŭdigi nian lingvon.

Jen pruvo. Eta anekdoto el tiu tago: en la restoracio nur kvar homoj sidis ĉe la apuda tablo kaj subite, dum Eric parolis kun ili, je nia granda surprizo, junulo respondis en Esperanto!

Ĉu li fariĝos estonta membro? ... eble!

Kelkajn tagojn pli frue, la 24-an de julio, Eric estis intervjuita de RCF-radio pri la historio kaj funkciado de Esperanto.

Jen ĉi tiu ligilo titolita: Après Babel, l'Espéranto:

<https://mallonge.net/rcf24>

Eliane PIRONNET

*Pliaj informoj kaj ligilo al komuna fotaro pri la evento aperas en la Beneluksa Bitarkivo: **<https://mallonge.net/124>***

Tri esperantistoj pasantaj tra Belgio kontaktis nin

Dum sufiĉe mallonga periodo, ĉirkaŭ dek tagoj, nia grupo estis kontaktita de la sekvaj homoj:

- Rianne Sanders kiu eklernis Esperanton per Duolingo antaŭ ol partopreni dumonatajn kursojn en Valencio (Hispanio) en aprilo kaj majo 2025. Ni babilis kune per Zoom.
- Vilhelmo da Bes Salazar, kubano vojaĝanta tra Eŭropo. Ni akompanis lin tra la "Parc de la Boverie" ĝis la urbocentro, kie li povis admiri la famajn "Escaliers de Buren" kaj la "Musée de la Vie Wallonne". Poste ni vizitis specialan farmobienon ĝuste meze de la urbo. La renkontiĝo estis tre agrabla.
- Iu biciklanto kiu tranoktis en Esneux danke al la "Route du SEL". Bedaŭrinde, ni ne povis renkontiĝi, ĉar li forlasis la regionon la sekvan matenon.

Eliane (membro de Liège Esperanto)



KER-ekzamenoj: transdono de atestilo

Okaze de la Esperanto-tago en Liège, Eric Nemes transdonis al Pierre Simon la atestilon B2 de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Ĉu vi volas scii pli pri Esperanto-ekzamenoj? Detaloj aperas en la retejo de Edukado.net <https://edukado.net/ekzamenoj/ker>

Stage d'espéranto à Ypres

Lernu Esperanton dum semajnfino en Ipro

En février 2025, Piet Glorieux de la FEL (Association flamande d'espéranto) organise un stage d'apprentissage de l'espéranto à Ypres.

Chacun est bienvenu du vendredi soir au dimanche après-midi pour suivre des cours de trois niveaux, dans une atmosphère agréable. L'hébergement se fera dans une maison de jeunesse, trois repas par jour.

La cotisation est de 130 euros pour les membres d'une association espérantiste et de 140 euros pour les autres.

L'inscription sera valide après le virement de la somme exacte sur le compte BE15 5230 8080 6230 de Esperantogroep La Konkordo.

Plus d'info & inscription en ligne : <https://eventaservo.org>

+32 472 257 918

piet.glorieux@gmail.com

ESPERANTO
Stage weekend
YPRES, 21-23 FEVRIER 2025

- 1**
DEBUTER
Pour ceux qui font leurs premiers pas dans le monde de l'Espéranto
- 2**
S'EXERCER
Pour ceux qui veulent améliorer leurs connaissances et capacités orales
- 3**
APPROFONDIR
Pour ceux qui veulent aller plus loin et aborder la littérature

Cours en Wallonie

Esperantokursoj en Valonio

A **Huy**, les **ateliers d'espéranto** se poursuivent. Ils auront lieu en présentiel les jeudis 10/10, 21/11, 05/12. Ils sont complétés par des échanges en vidéo conférence hebdomadaires.

A **Seraing** à la section primaire de l'Athénée de l'Air Pur, de 15h30 à 17h, nous avons commencé un **cours hebdomadaire** « Esperanto, accélérateur de multilinguisme » pour les enfants de 10 à 12 ans. Ce cours conçu par lernu.net (<https://lernu.net/instruado?lang=fr>) s'organise avec le soutien de l'Association des parents et de la direction. Des enfants sont très enthousiaste, mais ne parviennent pas toujours à convaincre leurs parents de les inscrire.

A **Liège**, une **table de conversation**, est organisée tous les mois le samedi matin de 10h15 à 12h30 à la librairie du voyage : TOUTES DIRECTIONS 3, rue de la Violette à Liège. Voir dates sur leur site : <https://toutesdirections.be/>

A **Namur**, un nouveau cours s'est formé dans le cadre de l'UTAN (Université Tous Ages de Namur). Il y a 9 nouvelles personnes au cours. La base du cours est le livre 'L'Espéranto, par la méthode directe' de Stano Marček.

Eric NEMES et Jean ANNET



Congrès d'espéranto en Afrique

Belgoj en la Universala Kongreso en Afriko

La 854 kongresanoj de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), venintaj el 65 landoj al Aruŝo, Tanzanio, inter la 3-a kaj 10-a de aŭgusto 2024, traktis la temon "Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo". La partoprenantoj de la kongreso ne nur diskutis la temon, sed samtempe prezentis modelon por pli bona mondo, en kiu homoj el multaj diversaj landoj povas pace kunvivi kaj interkomuniki sen tradukistoj per la inernacia lingvo Esperanto, kiun ĉiuj kongresanoj parolas.

Kun ĝojo la partoprenantoj konstatas, ke tiu unua Universala Kongreso en Afriko plene sukcesis. Ĝi pruvis, ke en Afriko la movado por neŭtrala internacia lingvo, nome Esperanto, estas vigla; ke ĝi aktivis en multaj landoj de la afrika kontinento; kaj ke la afrikaj esperantistoj liveras valoran kontribuon al la universaleco de la tutmonda Esperanto-movado. Kun sama ĝojo la partoprenantoj observas, ke multaj junaj homoj en afrikaj landoj lernas Esperanton en kursoj kaj ke en multaj afrikaj landoj estas planite organizi pli da kursoj por ebligi al pli da homoj personajn internaciajn kontaktojn per Esperanto.

La kongresanoj alvokas al ĉiuj homoj protekti la medion, ĉar sana medio estas antaŭkondiĉo por atingi la celon konstrui pli

bonan mondon. Ili alvokas al ĉiuj homoj de la tero konsideri utiligi dum vojaĝoj transportilojn, kiuj konsumas malpli da energio, prefere el daŭripovaj fontoj kiel suno aŭ vento, kaj kunlabori por kompensi la emision de forcejaj gasoj, kiam ankoraŭ ne eblas tion eviti. La kongresanoj konstatas kun kontento, ke la svahila lingvo funkcias kiel supernacia lingvo, kiu ebligas kontaktojn inter loĝantoj de pluraj ŝtatoj en Orient-Afrika Komunumo (OAK) sen bezono uzi lingvon de iamaj koloniaj imperioj. Ankaŭ ĉiuj aliaj afrikaj lingvoj meritas subtenon kaj necesas agnoski la lingvajn rajtojn de ties parolantoj, aparte en baza edukado, koresponde kun la rekomendoj de Unesko. Tio estas bazo por paco, por pli bona mondo.

Por tutmonda interkompreniĝo necesas komuna neŭtrala internacia lingvo, kiun ĉiu homo povu paroli apud sia gepatra lingvo. La kongresanoj konstatas kun ĝojo kaj fiero, ke ankaŭ en tiu ĉi kongreso evidentiĝas, ke Esperanto plene taŭgas por tiu celo.

https://revuoesperanto.org/UK-rezolucio_2024

Komuna fotaro de belgaj partoprenintoj kaj rilataj dokumentoj aperas en la Beneluksa Bitarkivo <https://mallonge.net/arusha24>



6ème Voyage Spécial au Népal

Esperanto-ekskuro al Nepalo

L'Association népalaise d'espéranto (NEspA) annonce un voyage spécial de 12 jours, **du 26 au 8 mars 2025**. La NEspA organise la Rencontre himalayenne tous les deux ans. La Rencontre Himalayenne signifie principalement du trekking en montagne, mais cela n'est pas possible pour tous les groupes d'âge. De nombreuses personnes partageant les mêmes idées souhaitent visiter le Népal, mais ont peur d'un tel voyage. Cette fois nous organiserons donc une excursion dans des lieux touristiques népalais célèbres accessibles en bus et sous de magnifiques paysages dont les célèbres chaînes de montagnes visibles à Pokhara, Katmandou, le parc national de Chitwan, Lumbini, Palpa et Pokhara.

Le mouvement espérantiste népalais se développe de plus en plus, mais si tous les membres de la NEspA ne peuvent pas visiter les pays étrangers à cause du coût, il est au moins possible d'inviter ici des amis d'autres pays. Et cela s'est avéré être un programme efficace. L'objectif principal du programme est de présenter le Népal et les espérantistes népalais au monde et les uns aux autres. (...)



La Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) anoncas 12-tagan specialan ekskurson de la 26-a ĝis 8-a de marto 2025. NEspA okazigas la Himalajan Renkontiĝon en ĉiu dua jaro (ĉi-jare ni okazigos la 14-an). La Himalaja Renkontiĝo signifas plejparte piedvagadon en la montaro, sed tio ne eblas al ĉiuj aĝgrupoj. Multaj samideanoj volas viziti Nepalon sed timas tian marŝadon. Ĉi-foje ni okazigos do ekskurson al famaj nepalaj turismaj lokoj atingeblajn per buso kaj sub belaj pejzaĝoj inkluzive la famajn montarojn videblajn en Pokhara, Katmanduo, Ĉitūan Nacia Parko, Lumbini, Palpa kaj Pokhara. La nepala Esperanto-movado kreskas pli kaj

pli, sed se ĉiuj anoj de NEspA ne povas viziti eksterajn landojn pro la kosto, almenaŭ eblas inviti amikojn el aliaj landoj tien ĉi. Kaj tio montriĝis fakte efika programo. La ĉefa celo de la program estas konigi Nepalon kaj nepalajn esperantistojn al la mondo kaj reciproke.

Nepalo estas ebria miksaĵo: fascina lando de antikva historio, viglaj kulturoj kaj popoloj, biodiverseco kaj majestaj pejzaĝoj. Ĝiaj geografiaj etendiĝas de belaj altaj neĝpintoj en la nordo, la malpli altaj montoj en la mezo kaj bela, fekunda ebenaĵo kun multaj arbaroj en la sudo. Situante inter Tibeto (Ĉinio) kaj la Ganga ebenaĵo (Barato), Nepalo tra sia historio sentis la influon de ambaŭ tre diversaj civilizacioj, sed samtempe kreis identecon por si mem. La lando havas preskaŭ 28 milionojn da homoj, parolantaj 125 lingvojn aŭ dialektojn. Okdek procento de la nepala popolo sekvas hinduismon, sed la lando estas oficiale sekulara, kaj fakte lando de multaj religioj. La templo de Paŝupatinath en Katmanduo estas unu el la kvar plej gravaj lokoj por adorantoj de Ŝiva. La Budho, la "Lumo de Azio," naskiĝis en Lumbini, kiu situas en la suda ebenaĵo, farante Nepalon sankta celo por pilgrimantoj. La multaj etnoj ofte kultas proprajn diojn.

Kvar lokoj de Nepalo estas agnoskitaj de UNESCO kiel mondheredaĵoj. En la unua, la valo de Katmanduo, reliefas la urbo de Bhaktapuro, la reĝaj placoj de Katmanduo kaj



Patano, la stupaĵoj de Svajambunath kaj Baŭdhnath, kaj la temploj de Paŝupatinath kaj Ĉangu Narajan. Dua kultura heredaĵo estas Lumbini. Plie estas la naturaj zonoj Everest Nacia Parko (1.148 km²) kaj Reĝa Ĉitaŭn Nacia Parko (932 km²), kiun ni vizitos dum la ekskurso.

Detaloj kaj aliĝilo aperas en <https://mallonge.net/nepalo25>

Voĉlegita raporto en UEA.facila

Pri la 5-a speciala ekskurso aperis artikolo en la retejo UEA. Facila. Ĝin voĉlegis Bharat Kumar Ghimire, la ĝenerala sekretario de Nepala Esperanto-Asocio kaj instruisto de Esperanto. Li estis unu el la organizantoj de la Ekskurso. Legu kaj aŭkultu la raporton en <https://mallonge.net/nepalo23>

Yves NEVELSTEEN

Le monde de l'espéranto

Novajoj el Esperantujo

Konfirmo pri samrajteco de Esperanto ĉe Eŭropa Unio

Rezulte de la reklamkampanjo pri Esperanto kaj posta letera kampanjo estiĝis rekta kontakto kun la Eŭropa Komisiono. Nun la departemento “Lernejoj kaj Multlingveco” konfirmis, ke por la projektoj de Erasmus+ kaj Kreema Eŭropo (Creative Europe) Esperanto estas samrajta kun aliaj lingvoj inkluzive de regionaj kaj minoritataj lingvoj. Laŭvorte la Komisiono skribis: “Projektoj povas subteni ĉiujn lingvojn sen diskriminacio, inkluzive de la regionaj kaj minoritataj lingvoj de Eŭropo aŭ Esperanto”. (*Projects can promote all languages without discrimination, including Europe’s regional and minority languages or Esperanto.*)

Esperanto jam estis parto de multaj programoj laŭ Erasmus+ kaj aliaj, sed ŝajne ne jam de Kreema Eŭropo. Tiuvoje eblos subvencipeti ekde nun. Krome la laŭvorta konfirmo de la Komisiono pri la samrajteco de Esperanto estas paŝo antaŭen kompare kun la ĝisnuna nura donado de subvencioj. Ni esperu, ke la praktiko estos influita de la deklaro.

Etsuo Miyoshi

La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2024/09/euro-po-6/>

Handikapabloj kaj esperantistoj ĉe Unesko

”Handikapabloj. Sporto kaj laboro: Ĉiuj gajnas per fizika kaj mensa ekzercado” – impulsis vortluda, sed samtempe serioza titolo de kongreso en la Pariza domo de Unesko, la 9-an de septembro, kun ĉeesto de esperantistoj.

Handikapo povas esti, krom obstakla, ankaŭ kapabligna en la vivo de trafito, kaj praktiki sporton instigas integriĝon al la labormerkato, pro la gajnitaj sperto kaj memfido. Siavice tio helpas ŝanĝi la rigardon de la socio al handikapito, kaj ofte eĉ la rigardon de la koncernato al si mem.

Jen kernaj mesaĝoj de la Pariza evento, striktadire aranĝo ne de Unesko mem, sed ja gastigita de ĝi. La kongreson patronis la konstanta delegacio ĉe Unesko de afrika ŝtato, la Unio de la Komoroj, kune kun sep NRO-j, unu el kiuj estis UEA.

La eventon mastrine estris esperantisto Nathalie Kesler, fondinto kaj estro de la porpaca NRO Pangee, cetere edzino de UEA-estrarano François Lo Jacomo. Gastis kaj rondatable interparolis dekoj da personoj aktivaj en sporto por handikapitoj aŭ en pli ĝeneralaj kampoj temrilataj. La plej renoma gasto estis Yannick Noah (nask. 1960), iam mondfama tenis ludanto

ĉu vi
scias?

franca, kantisto, nun konata ankaŭ pro sia socia engaĝiĝo interalie helpe al malriĉaj infanoj. Lin interpretis al Esperanto Cyrille Hurstel.

Nome, entute tri parolantoj de Esperanto sidis, flanke de la profesiaj interpretistoj al-anglaj kaj al-francaj, en budo por interpreti la tagon al Esperanto: krom Hurstel, elfrancisgis kaj elhispanigis István Ertl, elangligis Edmund Grimley Evans.

Inter la dekoj da alparolantoj estis la UEA-prezidanto Duncan Charters, la sola podiano kiu uzis Esperanton kaj tial necesigis surmeton de aŭskultiloj ĉe preskaŭ ĉiuj anoj de la eble 200-kapa publiko. Charters elokvente skizis paralelon inter la stato de lingva handikapiteco, kiun provis rimeredi Zamenhof, kaj aliaj handikapoj.

Alia esperantista podiano estis Pierre Dieumegard, cetere aktivulo de Eŭropo – Demokratio – Esperanto, kiu parolis france pri sia persona vivsperto de paraplegiulo.

Aŭdiĝis pliaj atestaĵoj, kiel de virino subite perdinta la gambojn kaj brakojn pro ekstrema kazo de malario, aŭ de junulino trafita de la muskoltorda malsano mioklonia distonio. Tri rondaj tabloj traktis temojn rilatajn al la sporta, labormerkata kaj ĝenerale socia aspektoj de handikapo. Kiel interludoj funkciis dancospektakloj fare de handikapitoj. La bonvenigan kaj tagmezan manĝeton prizorgis volontuloj de NRO.

Evidente, daŭris aludoj al la Paralimpiaj ludoj, kiuj finiĝis la antaŭan tagon samurbe.

Defion terminologian en Esperanto signifis la ofta apero



Edmund Grimley Evans kaj István Ertl en la interpretista budo. Foto: Cyrille Hurstel.

de diversaj vortoj kaj esprimoj temrilataj, kiel handikapito, handikapulo, plurhandikapito, rulseĝa rugbeo, ŝanĝado de la socia alrigardo kaj tiel plu. Nepre evitendas la uzo de malkapablulo, des pli kriplulo, kvankam troveblaj en alie trafaj Vikipediaj artikoloj.

Ne estas la unua fojo ke la kunlaboro inter Unesko kaj UEA konkretiĝas en partopreno ĉe aranĝoj en Parizo. Eĉ simila interpretado estis liverita en aliaj okazoj, Zamenhof-tage en 2008 kaj en konferenco pri la stato de Esperanto en 2017.

István Ertl

Aperinta en Libera Folio - <https://mallonge.net/unesko24>

Espéranto en Flandre - actualités

Novajoj pri la agado en Flandrio

Flandra Esperanto-Ligo havas novan dungiton

En septembro 2024 Lode Van de Velde eklaboris ĉe FEL. Li okupiĝas interalie pri membroadministrado, pri Monato kaj pri la libroservo de FEL. Lode estas konata flandra esperantisto, kemiisto laŭ eduko kaj pasia fotisto. Li esperantistiĝis en 1993 kaj laboris dum multaj jaroj kiel sekretario en artlernejo. Profesie li instruis Esperanton en Japanio dum 2 jaroj kaj dum diversaj malpli longaj eventoj. Lode estas eldonisto kaj verkisto. Li realigis multajn verkojn kaj mem gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA. En Vikipedio vi povas legi pli pri li: https://eo.wikipedia.org/wiki/Lode_Van_de_Velde

Café-langues à Gand

Le club d'espéranto de Gand participe régulièrement au TaalCafé Mondial, une rencontre bimensuelle de passionnées de langues. Vous y êtes le bienvenu ; c'est gratuit. Les organisateurs demandent juste de s'inscrire sur <https://www.taalcafemundial.gent> Plus d'infos sur https://eventaservo.org/o/La_Progreso

Ca existe, des cafés-langues en Belgique francophone ? Si bien, on s'inspire de l'expérience à Gand pour faire parler (de) l'espéranto au sud du pays ?

Yves *NEVELSTEEN*



Inspiraj rakontoj

La perdita horloĝo

Iam estis farmisto kiu malkovris ke li perdis sian horloĝon en la stalo. Ne estis ordinara horloĝo ĉar ĝi havis sentimentan valoron por li. Post longa serĉado alte kaj malalte en la fojno dum longa tempo, li rezignis kaj petis grupon da infanoj kiuj ludas ekster la stalo.

Li promesis ke la persono kiu trovas ĝin, ricevos rekompencon. Aŭdinte tion, la infanoj hastis en la stalon, trairis kaj ĉirkaŭiris la tutan fojnon sed daŭre ne trovis la horloĝon. Ĝuste kiam la farmisto volis rezigni, eta knabo iris al li kaj demandis duan ŝancon.

La farmisto rigardis lin kaj pensis, « Kial ne ? La infano ja aspektas sufiĉe sincera ».

Do la farmisto sendis la etan knabon en la stalon. Iom poste la eta knabo eliris kun la horloĝo en sia mano ! La farmisto estis samtempe ĝoja kaj surprizita kaj demandis la knabon kiamaniere li sukcesis dum ĉiuj aliaj malsukcesis.

La knabo respondis, « Mi faris nenion alian ol sidi sur la planko kaj aŭskulti. En la silento, mi aŭdis la horloĝon tiktaki kaj mi serĉis ĝin en tiun direkton. »

Moralo: Paca menso povas pensi pli bone ol ŝarĝita menso. Permesu kelkajn minutojn da silento al via menso ĉiutage,

kaj vidu, kiom akre tio helpas vin direkti vian vivon tiel kiel vi volas ke ĝi estu !

Du ranoj

Grupo da ranoj promenis tra arbaro kiam du el ili subite falis en profundan truon. Ĉiuj aliaj ranoj kuniĝis ĉirkaŭ la rando de la truo.

Kiam ili vidis kiom profunda estis la truo, ili ekdiris ke ili certe mortos. La du ranoj ignoris la komentojn kaj provis salti el la truo per ĉiuj siaj fortoj. La aliaj ranoj daŭre diris ke ili ĉesu, ĉar ili certe mortos. Finfine, unu el la ranoj obeis la kriojn de la aliaj ranoj kaj rezignis. Ĝi falis kaj mortis.

La alia rano daŭre saltis tiom forte kiom ĝi povis. Refoje, la aliaj ranoj kriis ke la peno ne havas sencon kaj ke ĝi simple mortu. Ĝi saltis ankoraŭ pli forte kaj finfine sukcesis eliri.


Verdire, la dua rano estis surda kaj ne povis aŭdi la aliajn ranojn. Ĝi simple kredis ke la aliaj ranoj kuraĝigis ĝin la tutan tempon.

Konklude: kedu je vi mem kaj ĉiam penu sincere por akiri tion kion vi volas; ne tuj kedu malkuraĝigajn homojn.

Eltirita de « Inspiraj rakontoj » – tradukis Lode Van de Velde – Eldono: Movado sen Nomo, 2015

Mots croisés

Krucvortenigmo



Elŝutu la solvon de la enigmo ĉi tie:

<https://mallonge.net/eem2024-3-solvo>

Vertikale 1. Kantbirdo 2. Ĉefurbo en Suda Ameriko 3. Malkomplimenti 4. Amatino de Zeŭso 6. Egipta sundi'7. Malveri 8. Mezum' 9. Paĝo 10. Azia monunuo 15. Maltarda 19. Binara dek 21. Juvelo 22. Cirkonstanca morfemo 23. Malgigant' 24. La farunto 25. 1010 en dekuma sistemo 26. Patriarko kun arkeo 27. Vivkomenco 32. Pagi por forsendi 33. Amindume interparoli (rad.) 35. Loĝaŭto 36. Ŝilingo mallonge 37. Malferma 38. Hara ŝtofo 39. Furioza malsano 40. Vosteto de "c" en iuj skriboj 45. Ruĝflava 49. Kameliaj' 51. Konkluda litero.

Horizontale 1. Stato de forta maltrankvilo 5. Nekonata, neŝatata 9. Okaz' 11. Kreemulo 12. La jara evento 13. Mallaste 14. Bibliulino 16. Romia 501 17. Likve iri 18. Maltrankvila 20. Unua medalo 22. Somermonato 25. Lando en Eŭropo 28. Orienta koncept' 29. Loko kiu ne ekzistas 30. Romia 6 31. Malĉeesti 34. Frakasiĝo 38. Malaperinta 41. Enmemore 42. Solenajo 43. Konfuza interjekcio 44. Oreler' 46. Ĝermana litero 47. Eksperimenta participo 48. Preventi malsanon 50. Lirika palindromo 52. Tekstero 53. Granda dento

V.Esp-o dispone d'une bibliothèque de plus de 1700 livres à Cerfontaine. Elle est visitable sur rendez-vous chez le bibliothécaire Claude Glady.

Renseignements : cglady@arcadis.be

Rencontres et cours réguliers :

Charleroi - <https://esperanto.be/charleroi>

Centre Culturel, rue du Château 3 - 6032 Mont-sur-Marchienne. Pour y participer: Michèle Villers michele.villers@hotmail.com

Eghezée Jean Annet - jean.annet@gmail.com
0495 10 32 30

Huy Philippe Draize - philippedraize@yahoo.fr

Liège - <https://esperanto.be/liege>

Eric Nemes - eric.nemes@gmail.com
0494 230 234

Namur Cours à l'UTAN tous les vendredis à 13h30. Jean Annet jean.annet@gmail.com

Tables de conversation :

Liège

Chez « Toutes directions ». Infos : 04 262 20 64
- <https://mallonge.net/td>

Louvain-la-Neuve

Catherine Royaux cat.royaux@netcourrier.com

Bonvenon al Schneiden (DE) Gebeneluksa Kongreso 2-5 okt. 2025

Jam rezervu la daton! La komuna germana-beneluksa kongreso okazos en Germanio, je 30 km de Monschau, proksime de la landlimo kun Belgio.

Temo: translime
Programo kaj aliĝilo
<https://benelukso.eu/kongreso>



© D. Ketz - nationalpark-eifel.de

Autres personnes ressources

- Jeunes et initiation : Valère Doumont 0485 517 552 doumontvalere@yahoo.fr
- Cerfontaine : Claude Glady 071 64 49 16 cglady@arcadis.be
- Charleroi : Rudy Cogniaux 0492 710 974
- Comines-Warneton : Jean-Claude Thumerelle - jcthum@gmail.com
- Lobbes : Jean-Pol Sparenberg 0475 272 319 jpsparenberg@brutele.be
- Plombières : Bernadette Poncelet, bernadetteponcelet@skynet.be
- Verviers : Jean-Marie Jacques jeajacques@voo.be

**Voulez-vous apparaître dans cette liste ?
Contactez-nous !**

L'espéranto c'est dans la poche

Cette brochure est une bonne base pour commencer à apprendre l'espéranto. Cette langue internationale s'apprend plus facilement que les autres du fait de sa grammaire logique et de son système pratique de construction des mots.

Découvrez d'abord l'espéranto dans la première partie et faites ensuite les exercices de la deuxième partie. À chaque leçon de grammaire correspond un exercice. À raison d'une leçon par jour, vous pourrez au bout d'une semaine comprendre un texte simple et faire quelques phrases.

Découvrez une langue en une semaine



à emporter !


L'espéranto, c'est dans la poche

découvrez une langue en une semaine



Recevez cette brochure gratuitement !

- via notre site : esperanto-wallonie.be
- communiquez votre adresse à esperanto.wallonie@gmail.com
- envoyez vos coordonnées par sms au n° de tél : 0485 51 75 52



6540-dépôt
Lobbès
P001014

Editeur responsable: Jean ANNET
V. Esp-o : rue de la Terre Franche, 31 - 5310 Longchamps
Exp : Jean-Pol Sparenberg
Ruelle de Thuin, 20 - 6540 Lobbès